

& Sankta Kristofero. Ni laboru kaj esperu!:

< Rekante 22 el 43 batoj por strofo, entute 301 paŝoj dum 4 minutoj. Verkis Marie Hankel (Sableroj, Leipzig 1911). Baladigis Martin Strid (2017) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

(#Melodio:

<:43> (/a;Mi /LaaLaTi do TiLa Si Mi;Mi doodore mi redo Ti Mi;Mi LaaLaTi do TiLa Si Mi;Mi doodore mi redo Ti La

(#Rekantaĵe: a;Mi LaTi do TiLa Si Mi;Mi dore mi redo Ti Mi;Mi LaTi do TiLa Si Mi;Mi dore mi redo Ti LaSi La)

)×7)+

(&Strofoj:

'1 "In/fano vi, jen sur la ŝultro, ; Pro kio vi tiel min premas? ; Facile mi supren vin levis, ; Kaj nun mi suferas kaj ĝemas.

(×:; **Trankvile paŝu en danco ; dum kreskas herboj en kampo. ; En pluvo branĉoj balancos, ; Trankvile paŝu en danca la ĉen'.**)

'2 Volonte mi al vi servadis, ; Helpema al eta infano, ; Nepeza al mi vi ja ŝajnis, ; Ludilo en mia la mano!"

'3 "Servisto fidela, ne plendu, ; Se mi vin premadas nun foje; Se multe mi kaŭzas suferon ; Ne perdu kuraĝon survoje.

'4 Mi devas ja kreski, kreskadi, ; Ĉar mi al la mond' apartenas, ; Mi estas la lingvo komuna, ; Al homoj nun ĉien mi venas.

'5 Mi estas Espero de l' mondo, ; Kaj tiun Esperon vi portas, ; Restadu fidela servisto, ; daŭrigu, vi certe ne mortas.

'6 Grandega la via penado, ; Senfina la via laboro, ; Sed kreskas ja ankaŭ la forto. ; La sindonemeco de l' koro.

'7 Vi devas trairi la mondon ; Kun via ligil' de l' espero, ; Ĝis kiam ĝi estos portita ; En ĉiun ajn lokon de l' tero."